

Esperanto kaj UN


Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 74, januaro-februaro 2025



Universala Esperanto-Asocio

Tago de Homaj Rajtoj2024: Kunfesti kaj kunprotesti



Ĉi-jare, la 10-a de decembro estis tago por kunfesti kaj kunprotesti en la Esperanto-movado. Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) je tiu tago atentigis, ke “Kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis proklamita en la jaro 1948, ĝi konsistigis promesplenan mesaĝon al mondo disvundita de terura monda milito. La diversaj ŝtatoj kun siaj diversaj popoloj aliĝis al la principoj prezentitaj en la Universala Deklaracio – kiel faris ankaŭ multaj neregistaraj organizoj. Universala Esperanto-Asocio deklaris tiujn principojn fundamentaj al la laboro de la Asocio.”

Temas do pri tago por festi la ekvalidiĝon de la Universala Deklaracio kaj ankaŭ la progreson de kerna principo de UEA: respekto al homaj rajtoj.

Samtempe, tamen, la mesaĝo de UEA okaze de Homrajta Tago portis sobriĝan tonon: “Hodiaŭ, la principoj de la Universala Deklaracio restas tro ofte malobservataj, tiel ke tutaj popoloj suferas militon, malriĉon, malsanecon kaj senhejmecon, milionoj da rifuĝintoj apenaŭ eltenas sian situacion, kaj konfliktoj kaj militoj multiĝas, kune kun malobservoj de bazaj homaj rajtoj.”

Sekve, UEA “urĝe alvokas al registaroj, internaciaj organizoj kaj simplaj homoj tra la tuta mondo, ke ili refortigu kaj renovigu siajn klopodojn por garantii la bazajn homajn rajtojn al ĉiuj homoj kaj popoloj.”

Aparte interesa al UEA estas lingvaj rajtoj kaj la rajto libere esprimiĝi: “En nia asocio ... ni aparte interesiĝas pri internacia komunikado, pri la rajto esprimi sin kaj esti aŭdata en spirito maksimume egaleca kaj inkluziva. Pro tio, ni pristudas kaj antaŭenigas lingvajn homajn rajtojn, kaj la vojon de interkompreniĝo inter malsamaj popoloj.” Unu el la ĉefaj celoj de la Asocio estas krei egalecon de lingva komunikado, do mildigon de la tro ofta praktiko, ke la posedantoj de pli fortaj lingvoj trudus tiujn lingvojn al la posedantoj de pli malfortaj lingvoj, tiel kreante malegalecon laŭ kiu fortaj silentigas la malfortajn.

Homrajta Tago koincidas ĉiujare kun la jubileo de la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko kiu en la jaro 1954 rekonis la rolon de Esperanto en alproksimigo de la popoloj de la mondo kaj tiel komencis kunlaboron inter UEA kaj Unesko. Ĉi-jare, samtage kiel Homrajta Tago 2024, festa kunveno en Montevideo, Urugvajo, kie okazis la Ĝenerala Konferenco de Unesko

en 1954, gastigis homojn el la tuta mondo por marki la 70-an datrevenon de kunlaboro inter la du organizoj.

Ĉiujare nia Asocio observas la Tagon de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, kune kun alia grava dato: la 15-a de decembro, kiam naskiĝis L. L. Zamenhof (1859-1917), la kreinto de Esperanto.

Ĉi-decembre la Zamenhof-Tago estis festata tra la tuta mondo, per specialaj kunvenoj, bankedoj kaj aliaj aranĝoj en dekoj da landoj – notinde Pollando (la naskiĝlando de Esperanto), Ĉinio, Japanio, Germanio, Brazilo, Hungario kaj Rusio.

La Homrajta Mesaĝo de UEA finiĝis per sindediĉo de UEA al la tasko: “Okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj 2024, ni renovigas nian promeson antaŭenigi la homajn rajtojn, agadi por minimumigi kaj forigi lingvajn obstaklojn en internaciaj rilatoj, kaj disvolvi komprenon kaj estimon inter la diversaj popoloj de la mondo. Sen interkompreniĝo ne eblas eviti militojn, ne eblas solvi la problemojn de la hodiaŭa mondo, kaj ne eblas krei la kondiĉojn por daŭripova mondo en estonteco.”

Konferenco en Montevideo markis 70 jarojn da kunlaboro inter Unesko kaj Esperanto por lingvaj homaj rajtoj

La 10-an de decembro, UEA festis ankaŭ la 70-an datrevenon de la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptita en Montevideo en tiu dato en 1954, kiu rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo." El tiu rezolucio sekvis starigo de formalaj rilatoj inter UEA kaj Unesko – kaj jam sepdek jaroj da kunlaboro. Interalie, UEA kunlaboras en la de Unesko organizita Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, kaj dediĉis sian ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto, en Montrealo en 2022, al tiu temo.

La programo de la aranĝo inkluzivis salutvortojn de la prezidantino de la Urugvaja Deputita Ĉambro, Ana Olivera, de d-ro François Lo Jacomo, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj (kiu estas ankaŭ reprezentanto de UEA al Unesko), kaj de Nathalie Kesler de la Neregistara Organizo Pangée, bazita en Parizo. Venis ankaŭ videosalutoj de Ahmad Mamduhi el Irano, prezidanto de ILEI (la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), Renée Triolle (Francio), antaŭa reprezentanto de UEA al Unesko, Laura Brazzabeni (Italio), prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, kaj Floreal Martorell el Francio, prezidanto de Eurokka. Persone salutis Gabriel Wagner kaj Silvia Rottenberg, respektive prezidantoj de Argentina Esperanto-Ligo kaj de Bonaera Esperanto-Asocio, kaj Querino Neto, prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo, kiu malfermis diskutpanelon inter la ĉeestantaj junaj esperantistoj pri la estonteco de la Internacia Lingvo.

La ceremonion ĉeestis, interalie, la konsulo de Kanado, Isabelle Roy. La aranĝo disvolviĝis sub gvido de Guy Matte (Kanado), prezidanto de la Amerika Komisiono de UEA, kaj de Sonia Rizzo, prezidanto de la Urugvaja Esperanto-Societo. Ĉeestis la aranĝon ankaŭ reprezentantoj de Esperanto-asocioj de diversaj landoj el Ameriko, Eŭropo kaj Azio kaj multnombra grupo de

junuloj, reprezentantoj de TEJO (la tutmonda organizo de junaj esperantistoj) kaj de la naciaj junularaj esperantistaj movadoj de la regiono. Aliaj partoprenantoj el diversaj mondopartoj sekvis la eventon rete per Jutubo kaj Zoom.

La salutojn sekvis videe registritaj prelegoj de Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA al UN en Novjorko, pri "Unesko, Lingvoj kaj Homaj Rajtoj" kaj Mireille Grosjean, unu el la reprezentantoj de UEA al UN en Genevo. Karine Ducloyer prelegis pri la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto, okazinta en Montevideo en 1954, samtempe kun la Ĝenerala Konferenco. Prelego de d-ro Lo Jacomo traktis la lingvan politikon de Unesko.

Dum la diversaj prelegoj oni emfazis la rolon de la internacia lingvo Esperanto, kiu ekzistas jam de 137 jaroj kaj kies celoj kaj idealoj kongruas kun tiuj de Unesko. Oni memoris, ke en Montevideo, Unesko dum sia 8-a Ĝenerala Konferenco rekonis la laboron de UEA, donis al ĝi la statuson de neregistara organizo kaj starigis konsultajn rilatojn kun ĝi. Filmeton kun la legado de la teksto de la Unesko-Rezolucio IV.4.422-4224 en Esperanto kaj en la hispana fare de esperantistoj el diversaj mondopartoj oni surekranigis kiel ero de la programo de la Konferenco.

La evento, kiu havis la subtenon de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo, inkludis muzikan partoprenon de la Ĥoro de la Lernejo pri Arta Edukado "Hugo Balzo" kaj fermiĝis per muzika prezentado de la argentina Esperanto-kantisto Alejandro Cosavella.

Resume, do, la Konferenco de Montevideo, okazinta la 10-an de decembro 2024, estis memoriga okazaĵo, kiu ree firmigis la gravecon de kunlaboro inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio en defendo de lingvaj homaj rajtoj. La ĉeesto de elstaraj reprezentantoj kaj junaj esperantistoj de diversaj landoj substrekis la tutmondan gravecon de la internacia lingvo Esperanto. La aranĝo ne nur rememoris la historian signifon de la Montevidea Rezolucio de 1954, sed ankaŭ lumigis la kontinuan strebadon por antaŭenigi lingvan egalrajtecon kaj kulturinterŝanĝon. Dum la pasintaj 70 jaroj, Esperanto daŭre servis kiel ponto inter diversaj popoloj kaj kulturoj, kaj ĉi tiu konferenco klare montris, ke la laboro por lingva diverseco kaj homaj rajtoj restas fundamenta – kaj ankoraŭ nekompleta. Rigardante la estontecon, la esperantista komunumo daŭrigos sian devontigon labori por monda interkompreno kaj inkluziva komunikado.